




---

---

# LA DEK-SEPA



Organe Mensuel Espérantiste.

---

RÉDACTION ET ADMINISTRATION : **H. de COPPET**  
179, Boulevard Pereire, Paris.

ABONNEMENT : 1 franc par an. — Ne paraît pas en Août et Septembre.

TARIF DES ANNONCES :

Une année : 1/4 page, 40 fr. : 1/2 page, 70 fr. : une page, 120 fr.

---

## GRUPO FUNDAMENTISTA « LA DEK-SEPA »

Groupe Espérantiste du XVII<sup>e</sup> Arrondissement de Paris.

Réunions amicales tous les Mercredis soirs, à 9 heures,  
Café de la Gare, 6, Place Pereire, Paris. Entrée particulière.  
Téléphone 530-46. Métro : Pereire.

---

### Nos Diners mensuels.

Les prochains Diners mensuels du Groupe auront lieu  
les Mercredis 4 Décembre 1912 et 8 Janvier 1913, à 8 heures  
très précises du soir, Café de la Gare, 6, place Pereire,  
Paris. Prix : 3 fr. 25 (boisson et pourboire compris).

---

### Prochaines Réunions.

- 4 Décembre. — Monata vespermango sekvata de esp. ludoj.  
11 Décembre. — **LE 8<sup>e</sup> CONGRÈS INTERNATIONAL  
D'ESPERANTO (Cracovie, Août 1912)**, par Monsieur  
ROLLET DE L'ISLE, Président de la Société française  
pour la propagation de l'Espéranto, Membre d'honneur  
de notre Groupe. — (Projections).  
18 Décembre. — Kunveno de U. E. A. Paroladeto de S-ro  
R. BOLLACK. Subdelegito de U. E. A. en Paris.  
8 Janvier 1913. — Monata vespermango sekvata de esp. ludoj

## AVIS IMPORTANT

Noël 1912 et le 1<sup>er</sup> Janvier 1913 se trouvant être un mercredi, le Comité a décidé qu'il n'y aurait pas de réunions ces 2 jours, mais une réunion *exceptionnelle* aura lieu le **Samedi 28 Décembre 1912, à l'Institut d'Art, 4, rue Demours, Paris XVII<sup>e</sup> (Métro: Ternes), à 9 h. du soir.**

Au programme : une comédie, précédée d'une causerie de M. Gilbert Daniel sur la Nouvelle-Calédonie (projections).  
— Vestiaire obligatoire : 50 cts.

Les membres de notre Groupe sont cordialement invités par le Groupe de Paris « Verda Stelo », à la réunion mensuelle des Groupes Parisiens, le vendredi 6 décembre 1912, à 9 heures du soir, 129, rue Marcadet, Paris (Nord-Sud : Lamarck-Caulaincourt).

*Le Secrétaire :* ROBERT BOLLACK.

## NOS COURS

Ecole, 7, rue St-Ferdinand, jeudi 8 h. 1/2 soir (Société d'Enseignement Moderne).

Ecole, 44, rue Pouchet, jeudi 8 h. 1/2 soir (Association Polytechnique).



KONTRAŬ  
M A R -  
M A L -  
S A N O

# DELPHININE

KONTRAŬ  
FERVOJ -  
M A L -  
S A N E T O

De l' DOKTORO FLASSCHEN.

Tiu ĉi farmaciaĵo, absolute sendanĝera, ricevis la **Grandan Premion** ĉe la Internacia Ekspozicio de Higieno, okazinta en Parizo en 1908.

Prezo de la boteleto : 10 fr. (4 S).

Aĉetebla ĉe S-ro WEITZ, 8, Rue de Duras, Paris  
kaj ĉe ĉiuj farmaciejoj.

## Grupo Fundamentista « La Dek-Sepa »

(Groupe Espérantiste du XVII<sup>e</sup> Arrondissement de Paris)

### *Assemblée générale.*

Le Groupe s'est réuni en Assemblée générale le 13 Novembre 1912, à Paris, Café de la Gare, 6, place Pereire.

La séance était présidée par M. Rollet de l'Isle, président de la S. F. P. E., membre d'honneur du Groupe, assisté de M. Henri de Coppet, président du Groupe.

L'Assemblée ratifie l'élection de M. Daniel comme trésorier et membre du Comité.

Après le rapport moral et financier, le Groupe a décidé d'envoyer une adresse de douloureuse sympathie à la famille de notre regretté samideano M. le Docteur Dor.

La résolution suivante a été, ensuite, adoptée à l'unanimité :

Le Groupe Espérantiste du 17<sup>e</sup> Arrondissement de Paris (Grupo Fundamentista « La Dek-Sepa »), réuni en Assemblée générale, le 13 Novembre 1912 :

Considérant que les efforts de *tous* les groupes parisiens sont indispensables pour organiser le Dixième Congrès international d'Esperanto qui doit avoir lieu à Paris en 1914,

1<sup>o</sup> A l'honneur de faire part au *Comité local d'Organisation* de son intention *formelle* de participer au Congrès, d'une façon active, en étant représenté dans le Comité d'Organisation du dit Congrès.

2<sup>o</sup> S'engage à faire pour le mieux, en ce qui le concerne, pour la réussite de ce Congrès.

*Le Secrétaire :* ROBERT BOLLACK.

---

**Erratum.** — Dans le numéro de « La Dek-Sepa » de Novembre 1912, page 3, ligne 30, au lieu de : *nous nous en souviendrons longtemps* — lire : **nous nous souviendrons longtemps.**

## NOTRE INSIGNE « LA DEK-SEPA »

A la dernière Assemblée générale du Grupo Fundamentista « La Dek-Sepa », les membres présents ont pu admirer le superbe modèle de carte présenté par notre talentueux camarade Georges Lhermitte, carte qui a fait l'admiration de tous, sans exception, et qui fut adoptée à l'unanimité.

Notre Groupe se devait encore à lui-même de posséder un insigne vraiment espérantiste qui fit honneur au Groupe et à ceux qui devaient le porter.

Nous avons eu la main heureuse en la circonstance, car nous avons réussi à faire exécuter par un artiste de valeur un insigne vraiment spécial en son genre et *surtout bien espérantiste*.

La partie principale de l'insigne représente, en relief, la galère de la ville de Paris voguant à toutes voiles vers l'étoile verte qui l'inonde de ses rayons lumineux.

Le fond de l'insigne présente en superbe émail les deux couleurs de la Ville de Paris, bleu et rouge, sur lesquelles tranchent très heureusement les mots « Dek-Sepa ».

Le prix de cet insigne est de **Fr. 2**, pris au siège du Groupe. Il est inutile d'insister bien longtemps sur l'utilité incontestable du port de cet insigne par nos membres.

Toutes les fois que nous avons voyagé en Groupe, nous avons vu les difficultés soulevées par les compagnies de Chemins de fer au sujet de la qualité de nos membres ; de plus, vu la beauté de cet insigne, il deviendra une réclame des plus prospères pour notre cher « Dek-Sepa » qui possédera dorénavant une carte et un insigne dignes de son actuelle prospérité.

---

**S**E VI SUFERAS pri la STOMAKO aŭ la INTESTOJ, ne hezitu unu minuton provi la

### **MAYA BULGARE**

Bulgara Lakta Kazeajo, kaj vi neniam plu suferos.

Informoj estas riceveblaj de la Societo

**Maya Bulgare, 332, rue St-Honoré, Paris. Téléphone 214-40.**

## NEKROLOGIO

### Leopold Elb.

Lastan someron, la germana Esperantistaro perdis, en la persono de S-ro Leopold Elb, Lingva-Komitatano, unu el la plej simpatiaj kaj lertaj samideanoj. S-ro Leopold Elb sin okupis pri la Esperanta Komuna Vortaro, kaj estis unu el la organizintoj de la Kvara Kongreso en Dresden ; en tiu ĉi urbo li loĝis.

Lia familio ricevu nian kondolencan senton.

### D-ro H. Dor.

La 29-an de Oktobro, en Lyon, nia bona samideano mortis. D-ro Henri Dor estis unu el la plej fidelaj Fundamentistoj, unu el la plej fervoraj subtenantoj de nia movado.

Lerta okulisto, li multe helpis S-ron Cart en la propagando de Esperanto inter la blinduloj. Lingva-Komitatano, komitatano de nia S.F.P.E., prezidanto de la Federacio Esperantista « Rhodanienne », prezidanto de T.E.K.A. (Tutmonca Esperantista Kuracista Asocio), membro de U. E. A., li lasos post si, en tiuj rondoj, neforgeseblan senton de amikeco kaj de boneco. Dum la Sepa Kongreso en Antverpeno, li montris al ĉiuj, kiel li komprenas la amikecan devon, kaj neniu forgesos la sintenadon de tiu blanka kaj energia maljunulo, en tiu cirkonstanco. La franca registaro, lastan someron, ordenis lin Kavaliro de la « Honora Legio ».

Li naskiĝis en Vevey, en 1835.

Al lia familio ni esprimas nian kondolencan senton kaj simpatian malgajan !

« *La Dek-Sepa* ».



## Novaj reformoj de U. E. A.

---

La tri proponoj pri la financa reformo de U. E. A., submetitaj al la ĝenerala voĉdonado per nia lasta *Oficiala Bulteno* estis akceptitaj per 69 voĉoj kontraŭ 14 (vidu protokolon en *Esperanto* de 20. Oktobro, Oficiala Informilo de U. E. A.

Konsekvence, la membra kotizaĵo por U. E. A. estas fiksita je 1 *S.*, el kiu la Delegito sendos 80 sd. al la Centra Kaso kaj konservos 20 sd.

La kotizaĵo por 1913 estas de nun pagebla.

**Fakaj kotizaĵoj.** — Por 1913 ekzistos interne de U. E. A. la jenaj specialaj fakoj:

*Universala Intersanĝa Asocio* (Intersanĝa fako), kiu celas kunigi ĉiujn Esperantianojn dezirantajn intersanĝi korespondaĵojn, poŝtkartojn, poŝtmarkojn, ĉiuspecajn objektojn, kun garantioj de regula respondo.

*Universala Virina Asocio* (Virina fako), kiu celas faciligi la rilatojn inter la Esperantianinoj, studi ĉiujn demandojn kiuj koncernas la plibonigon de la socia stato de la virinoj kaj propagandi Esperantismon ĉe la virinoj.

*Universala Laborista Asocio* (Laborista fako), kiu celas faciligi la rilatojn inter la diverslandaj laboristoj, studi ĉiujn demandojn kiuj koncernas la starigon de praktikaj servoj por laboristoj kaj propagandi Esperantismon ĉe la laboristoj kaj laboristaj institucioj.

Tiuj fakoj jam ekzistis la lastan jaron. Krom tio estis kreita nova, sub la nomo:

*Universala Studenta Asocio* (Studenta fako) kiu celas faciligi la rilatojn inter la diverslandaj studentoj, studi ĉiujn demandojn kiuj koncernas la starigon de praktikaj servoj por studentoj kaj propagandi Esperantismon ĉe la studentaro.

La jara kotizaĵo por ĉiu fako estas 50 sd. Ĉiu membro de fako *devas esti samtempe membro de U. E. A.* por la kuranta jaro.

(Laŭ « Esperanto ».)

---

# LA LASTA PROVO

De **Geo. Casella.**

(*Dakrigo kaj fino.*)

La dua matene batis, kiam malfermiĝis la pordo de l' hotelo Gleckstein. Flossie aperis, observis kun mallonga rigardo, la profundan ĉielon, steloplena, belega, kaj rekuragiĝita ŝi komencis malvolvi la ŝnuron sur la teron.

En la dometo, Andreo finis « lavi la tasojn » en kiuj ili ĵus estis trinkintaj kafon. Li balais la maldelikatan pargeton, viŝis la tablon kaj ordigis ĉion. Poste, li ĉirkaŭis siajn tibi-karnojn per feltaj rubandoj, kunprenis la sakon kaj la pikfosilojn, riglis zorge la pordon kaj venis rekunigi Flossie'n, kiu ekbruligis la faldemajn lanternojn.

Ŝi estis liginta la finon de l' ŝnurego ĉirkaŭ sia talio. Andreo imitis ŝin. Tiam, ĉar la vento iom blovis, ili mallevis ĝis la ŝultroj siajn ĉapojn, similigantajn lanajn kaskojn; vestis la manojn per dikaj gantoj, poste foriris kun egala paŝo, unue iom ŝanceliĝa.

Ili rondiris la dometon kaj alrampis deklivon, sur kiu kreskis la lastaj herboj. Baldaŭ vidiĝis nur ŝtonegoj. Ĉiu kreskajaro estis malaperinta. La ŝtonoj flavaj, ardezaj, ŝajnis tie amasigitaj jam de centjaroj. Ili dispeciĝis sub la piedoj.

Andreo kaj Flossie tamen akcelis sian iradon; seka vento fendetigis iliajn lipojn; iliaj fingroj rigidigis sur la tenilo de l' pikfosiloj kaj el iliaj okuloj elfluis nevolaj larmoj. Ili devis halti antaŭ neĝa kampo elmetita kiel zono sur la flanko de l'monto.

Flossie enpikis sian pikfosilon en tiu ĉi neĝo, alkraciis sian lanternon al ĝia pinto, sidiĝis sur grandega ŝtonego kaj malvolvis karton sur siaj genuoj; Andreo kliniĝis por lumigi al ŝi. — Dekstren... Maldekstren... La terura naturo, kiu ĉirkaŭis ilin ŝajnis neatingebla.

Antaŭ ili estis serio da mallumaj pintoj, elstarantaj kiel araneaj piedetoj; grandega dentuma muro altiĝis malproksime; maldekstre estis la profundegaĵo; dekstre, la glacioj kun ĝiaj malfermitaj fendoj, kaj poste la grupo de la « Schreckhörn » starigis al la ĉielo sian duoblan, akran, minacantan pinton... Sur la zenito, larĝa streko eklumiĝis, ŝajnis flugi kiel vualo, etendiĝis, dividiĝis en mil deŝiritaj skarpoj. La



neĝa supraĵo fariĝis skarлата kaj jam la neĝejoj ekkrakis sur sia fundamento.

— Mi trovis, — diris Flossie. — Ni surrampos la duan dekstran denton, poste, ni turnos dekstren per tiu ĉi koridoro. Sed ni rapidu, ĉar jen venas la suno. . . .

Ili estingis siajn lanternojn kaj la taglumo aperis blua kun strangaj oranĝaj strioj. Post signo de Flossie, Andreo marŝis la unua kaj ili surrampis la neĝan deklivon, kiu ĝemis sub la mordo de la najloj de l' ŝuoj. Ili enplantis siajn piedojn oblikve, kiel oni internigas hakilon en ŝtipon, kaj per la plando subpremis fortikajn kaj larĝajn ŝtupojn. Ili lasis post si oblikvan postsignon, kiu rekunigis la krutan pintaron, kiam la suno subite aperis sur la Granda « Schreckhorn » kiel bulo de kaptopilko.

Tiam, ĉiuj malbonaj fortoj de l' naturo malkvietiĝis. La torentoj, mutaj dum la nokto, bruegiĝis, la degelitaj ŝtonoj ruliĝadis de l' supraĵoj kun funebra fajfbruo. Ili frapis sur la ŝtonegoj, resaltis kaj ŝajnis alte flugi, kiel grandaj birdoj.

Dekstre, sur la glaciejoj, la lavangoj semis pulvon tumulta kaj diamanta.

— Ni rapidu! — diris Andreo, tre pala.

Sed Flossie observis malluman nubon, kiu elvenis el la valo. Flossie estis virino, ŝi timis nur la nekonatajn danĝerojn; sed ŝi timis ilin terurege. Ŝi divenis la fulmotondron, kaj ŝia irado fariĝis nerva kaj neregula.

La ŝtonoj traflugis pli nombraj, ŝi malbone evitis ilin. Unu el ili, tuŝetinte ŝian orelon, ŝi ekkriis. Kiam la unua fulmo ekbrilis, ŝi jetis sian pikfosilon, turnis sian dorson kontraŭ ŝtonego, la vizaĝo turnita al la profundegaĵo:

— Ne iru plu antaŭen, Andreo! kaj malligu nin. Se mi estos frapita, vi, almenaŭ ne mortos.

Ŝia voĉo estis tute ŝanĝita. Andreo rifuzis obei. Li konis la danĝeron de fulmotondro je tiuj altaĵoj, sed li miris la novan sintenadon de Flossie, ĉiam tiel kuraĝa.

— Ni malsupreniru, — diris li.

— Neeble!!!

Efektive, la nubo kovris la tutan « Wetterhorn », ĝi premegis ĝin de ĝia peza kaj densa maso. Hajlo falis, densa, dolora; Flossie kaŝis sian kapon en la manojn kaj restis senmova. Subite, Andreo vidis ŝin ŝanceliĝi, levi la brakojn kaj fali sur la teruran deklivon. Li arkiĝis kun la kruroj, tiris sur la ŝnuregon kaj haltis Flossie'n en ŝia falo. Estis



neebla, ke ŝi estu vundita. Li malsupreniris ĝis li atingis ŝin, prenis ŝin en siajn brakojn kaj apogis ŝin kontraŭ la ŝtonego. Li parolis al ŝi por trankviligi ŝin, kaj malkvietigis, vidante ŝin ĉiam senmova.

Dum li provis sidigi ŝin, Flossie klinigis la kapon sur sian bruston. Li tiam rimarkis, ke ŝi havis sangan cikatron sur la nuko. Silenta ŝtoneto estis frapinta ŝin el la altaĵoj.

Flossie estis senviva !!...

Kaj la vetero fariĝis denove belega, la monto kvietigis, kaj Andreo sovaĝa, nekonscia, starante apud la korpo de sia fianĉino restis eĉ sen gesto, sen larmo, la okuloj turnitaj al la profundegaĵo, kiu malfermiĝis ĉe siaj piedoj. Li rigardis nek la monton, nek la mortintinon. Li eksentis neesprimblan teruron. Neklaraj figuroj enmiksiĝis en sia spirito. Li ne movis ĝis la vespero kaj ne ŝajnis rimarki la nokton. Li eĉ ne forpelis la korvojn, kiuj turnis ĉirkaŭ sian frunton. Li vidis la neĝan mondon pleniĝi je malamikaj fantomoj!

Ĉirkaŭ la fino de l'dua tago, li ekvidis kelkajn fantomojn, kiuj balancis lanternojn kaj kiuj ritme suprenrampis, laŭlonge de la ŝtonego. Sen ia miro, li vidis ilin alproksimiĝi de li.

Estis kvar barbulaj viroj, envolvitaj per ŝnuregoj kaj ŝarĝitaj per sakoj. — Li ne komprenis, ke estis gvidistoj venantaj por trovi lin.

Sed kiam li aŭdis ilian kompaton antaŭ la mortintino, tiam li rekonis Flossie'n kaj diris dolĉe :

— Estas mi, kiu mortigis ŝin. . . .

Poste, li ridegis malsprite.

*Tradukis H. de Coppet.*

---

## LA VERA TIZANO DE L' PASTRO DE DEUIL

preparita de S-ro Duvergier, en Argenteuil, mirinde efikas kontraŭ ĉiuj doloroj, reŭmatismoj, neŭralgioj, kontraŭ la aĝatakoj, la mallakso kaj la grasegeco.

La paketo : 1 Fr. 50 (Sm. 0,60)

===== Tuj ricevebla kontraŭ poŝtmandato. =====

Specimeno kaj broŝuro senditaj senpage tuj post demando al  
S-ro DUVERGIER, 9, Rue Laffitte, Paris.

## Bibliografio.

**Plena Klasika Libro de Esperanto**, ordigita de S-roj TH. CART kaj E. ROBERT. — Presa Esperantista Societo, 33, rue Lacépède, Paris. Prezo: 1 fr. (Sm. 0,400) sen ingo, — 1 fr. 25 (Sm. 0,500) kun ingo.

Tiu ĉi verko estas ĉefverka libreto (formato 9×6×0,5 cm., pezo 30 gr., paĝoj 160).

Ĉiu fundamentisto posedos tiun rimarkindan france-angle-germane-esperantan vortaron, entenanta nur la fundamentajn vortojn kaj tiujn de la Oficiala Aldono de la Akademio. La vortaro estas antaŭigata de la 16 reguloj de la Fundamento, de la Deklaracio de Boulogne-sur-Mer (1905) kaj de la Akademia decido (propono Hankel) pri la enkonduko de novaj vortoj. Tiu lasta parto speciale estas legota de ĉiuj, ĉar ĝi estas leginda. Tiu verko honorigas la firmon, kiu ĝin eldonas.

**Historio de la lingvo Esperanto** (Unua Parto, 1887-1900), de EDMOND PRIVAT. Eldonita de U. E. A., 10, rue de la Bourse, Genève. Prezo: 1 fr. 25 (Sm. 0,500).

Kun intereso, eĉ kun emocio, ĉiu esperantisto legos tiun novan libron, kiu pritraktas pri la historio de nia lingvo. Multaj el la nunaj esperantistoj ne konas la malfacilaĵojn, kiujn D-ro Zamenhof renkontis, kiam li kreis sian genian verkon. S-ro Privat, unu el niaj plej satataj verkistoj, revivigas tiun periodon de Esperanto: la agrabla skribmaniero de nia samideano faciligas la legadon kaj oni nur bedaŭras la mallongecon de la rakonto.

\* \* \*

Esperantistoj, fundamentistoj! mendu tiujn legindajn librojn ĉe nia semajna kunveno de la Grupo Fundamentista « La Dek-Sepa » (6, Place Pereire, Paris).

ROBERT BOLLACK.

---

### OUVRAGES de M. Henri de Coppet.

*En vente à la Rédaction de « La Dek-Sepa ».*

L'Esperanto appris sans maître en 15 leçons . . . . .	fr. 1,50
Recueil de phrases, édition Française-Esperanto, plus de 2800 phrases de la vie usuelle . . . . .	fr. 1,80
L'Espero, hymne espérantiste de D-ro L. L. Zamenhof, édition pour ténor ou soprano . . . . .	fr. 1,50

# Muzikeldonejo A. BESNARD

26, rue Antoinette, 26 -:- PARIS

Esperantia Entrepreno. — Komerca Konsulo de U. E. A.  
Konto ĉe Ĉekbanko Esperantista.

Specialvendejo de esperantaj gramofonaj diskoj, gramofonoj,  
violonoj, mandolinoj, gitaroj, k. t. p.

Komerco kaj eksporto de klasikaj kaj modernaj muzikaĵoj  
por ĉiuj muzikiloj, esperantaj kaj ĉiulingvaj kantoj.

## SENSACIA NOVAĴO !!! ESPÉRANTAJ DISKOJ !!!

KANTOJ	}	La Espero . . . . .	L. L. ZAMENHOF
		Al vi . . . . .	BEMBERG
DEKLAMOJ	}	Preĝo sub la verda standardo	L. L. ZAMENHOF
		Blanka vualo . . . . .	V. DEVJATNIN

Ĉiu duobla disko : 4 fr. (1.600 Sm.)

Katalogoj estas sendataj senpage al ĉiuj dezirantoj.



La plej malnova el ĉiuj Esperantistaj gazetoj, fondita en 1895

# LINGVO INTERNACIA

CENTRA ORGANO DE LA ESPERANTISTOJ

eliranta post la 15. de ĉiu monato.

Ĉefredaktoro : **TH. CART**

Jara abono : **5 fr. (2 Sm.)**

# JUNA ESPERANTISTO

Monata Gazeto Beletristika por Junuloj, Instruistoj kaj Esperanto-Lernantoj.

Ĉefredaktoro : *Paul de Lengyel*. Direktorino : *F-ino C. Royer*.

Jara abono : **2 fr. 50 (1 Sm.)**

*Lingvo Internacia* kaj *Juna Esperantisto* kune :

**6 fr. 25 (Sm. 2,50).**

Post la 1. Januaro 1913, la jarabono al « Juna Esperantisto »  
estas 3 fr. (Sm. 1,200), kaj « Lingvo Internacia » kaj « Juna Es-  
perantisto » kune : 7 fr. (Sm. 2,800).

Preso Esperantista Societo, 33, rue Lacépède, Paris.



*Vera  
Ferhava Salo  
alsimiligobla*

ELTROVITA DE  
**M. Maurice ROBIN**  
en 1881.

**LA**

**Fer Robin**

*mirinde efikas*

KONTRAŬ

**SENSANGECO,  
PALKOLOREGO,  
SANGELFLUO,  
ĈIUSPECAJ**

Akoelas la nutradon kaj  
neniam mallaksigas.

Tiun ĉi kuracilon, absolute sengusta, oni uzas laŭ la dozo de 10 ĝis 30 gutoj ĉiu mango, ĉu en la da akvo aŭ vino. La enhavo de la boteto reprezentas la daŭron de tri semajnoj ĝis unu monato da kuracado.

Por eviti la falsajojn

**POSTULU** la **ROBIN**

VENDEJO POGRANDE :

**13, Rue de Poissy, PARIS**

Imprimerie Espérantiste V. Polgar, 33, rue Lacépède, Paris.

Le Gérant : L. DESPRÈS.